


# Gazeto



# Andaluzia

REDAKCIO

DIREKTANTO: J. GARZÓN RUIZ

Cefaj kunlaborantoj: *E. Cano, I. Casas, R. Codorniu, J. D. Coronado, C. Escobés, E. González Escandón, J. Hedley-Ince, V. Inglada, P. Linares, A. López Villanueva, E. Llamas, M. Pece, R. de la Peña, A. Roca, G. Ruiz, F. Soler, Maria del M. Terrones, M. Terrones.*

1.<sup>a</sup> Jaro.

Augusto de 1910.<sup>a</sup>

Numero 8.<sup>a</sup>

**ENHAVO:** Andaluzio — La Kapitano Veneno (Daŭrigo). — Kroniko. — Crónica. — Humorajhoj. — Anoncoj.

## Andaluzio

La turmentanta kolerego de la literaturaj turistoj ne povis ŝteli al nia patrujo ĝiajn ĉarmoju. Dumas, dirante ke l'Afriko homencas de la Pirineoj pro tio ke li kredis insulti Hispanujon, amindumis Andaluzion. En Hispanujo kaj pli ol en Hispanujo en Andaluzio estas multe el Afriko: la varmo, la amemo, la persona kuraĝo, la potencanta kaj hela floraro. Claudiano, en sia laŭdaĵo al Serena'o, montras tiel la plej sudan regionon el Hispanujo: «Kiam noktigas la tago sin banas en ĝiajn ondojn la lacigintaj astroj; rica pro ĉevaloj, produktema pro paŝtherboj, sufiĉega pro multekostaj metaloj, fruktedona per virtaj principoj, la centjaroj ŝuldas al ĝi

## Andalucía

La saña mortificante de los turistas literarios no ha podido robar á nuestro suelo sus encantos. Dumas, al decir *que el Africa empezaba en los Pirineos*, creyendo injuriar á España, piroteó á Andalucía. En España, y más que en España en Andalucía, hay mucho de Africa: el calor, la pasión, el valor personal, la flora dominadora y esplendente. Claudiano, en su elogio á Serena, indica así la región más meridional de España: «Al declinar el día se bañan en sus ondas los astros fatigados; rica en caballos, fértil en pastos, abundante en preciosos metales, fecunda en principios virtuosos, los siglos le deben á Trajano y la progenie de los Elios.»

Trahanon kaj la genton de la Elios'oj».

Fluglulante super la Markolo (1) ni ĉirkaŭpremas du kontraŭajn malproksimvidon: la Mediteraneon kaj la Oceaneon (2), la maron de la fantazioj kaj la maron de la nekredblaj realaĵoj. Gardas la unua la legendojn de la greka insularo, la dua tiujn de la amerika kontinento; oni kredas vidi sur unu la ŝipon de Ulises'o, kun ĝiaj linaj veloj kaj ĝiaj felsakoj plenaj je vento, kaj sur la alia la karavelo de Kolombo, sur kies ferdeko rebrilas la plumfaskoj kaj la aceraj dorsdefendiloj. Certigas la Mediteraneo ke pro ĝi ekzistas la Historio, kantas la muzoj kaj tremoviĝas la fermigiloj kaj la beleco; kaj juras l'Oceano ke se ĝi ne estus pruntedoninta novan sukcon al la maljuna kaj rigidigita mondo, ankoraŭ restis Eŭropo najlita kiel egipta mumio en mammezuraĵo da tero.

El tiuj maraj provincoj surmontriĝas Kadiz'o kaj Malako: ambaŭ distingigas en nia historio de la unuaj epokoj kaj gardas en siaj muregoj nepereigeblajn restojn de grandeco.

Se ni forlasas la Marbordon kaj eniras en kordobon kaj Sevilon, ni ĝuos pro la pentrindaj altaĵoj de la unua; ĝiaj pintmontaroj, ĝiaj valoj kaj montetoj, ĝiaj preskaŭ ĉiam varmetaj kaj printempaj marventetoj; kaj pro la ravaj pejzaĝoj de la dua, ĝiaj kampoj de greno, de olivarbejoj kaj oranĝarboj, ĝiaj arbaroj de kaŝtanoj kaj kverkejoj. La Guadalquivir'o eble estas plej tordolinia rivero el

Meciéndonos sobre el Estrecho, abarcamos dos lontananzas opuestas: el Mediterráneo y el Océano, el mar de las fantasías y el mar de las increíbles realidades. Guarda el primero las leyendas del archipiélago griego, y el segundo las del continente americano; créese ver en el uno la nave de Ulises, con sus velas de lino y sus odres llenos de viento, y en el otro la carabela de Colón, en cuya cubierta relucen los airones de plumas y los espaldarros acerados. Afirma el Mediterráneo que por él existe la Historia, cantan las musas y palpitan las formas y la belleza; y jura el Océano que si él no hubiera prestado nueva savia al mundo viejo y entumecido, aún permanecería Europa clavada como momia egipcia en un palmo de tierra.

De estas provincias marítimas se destacan Cádiz y Málaga; ambas figuran en nuestra historia desde las primeras épocas y guardan en sus muros restos imperecederos de grandeza.

Si abandonamos la Costa y entramos en Córdoba y Sevilla, gozaremos con las alturas pintorescas de la primera; sus sierras, sus valles y colinas, sus brisas casi siempre templadas y primaverales; y con los deliciosos paisajes de la segunda, sus campos de trigo, de olivares y narajos, sus bosques de castaños y chaparrales. El Guadalquivir es acaso el río más tortuoso de la Península, y sus accidentes acaban con cierta manso dumbre en las campiñas hispalenses: por eso se muestra aquí en todo su esplendor: sus soberbias ondas

(1) Gibralta markolo.

(2) Atlantika Oceano

la Preskaŭinsulo, kaj ĝiaj akcidentoj finiĝas kun ia dolĉanimeco, en la Seviljaj kamparoj: tial ĝi sin montras ĉi tie laŭ ĝia tuta brileco: ĝiaj belegaj ondoj ŝajnas en nia ebenaĵo soldataro marŝanta tra longaj arbaroj, estante lokoj, ekzemple la du famkonataj insuloj, en kiuj, kiel en la Bosforo, montriĝas la plezura spektaklo, la spegulaeroj, dum la helaj kaj sennubaj tagoj.

La floraro estas tial brilantega. Ĝia modera kaj mallonga vintro kreskigas la tropikajn kreskaĵojn kaj helpas la daŭradon de plej delikataj specoj. La oranĝa, la migdala, la granata, la citrona, la abrikota, la persika ujoj estas ĝiaj favorataj arboj; la rozoj kreskas tiel multekvante kiel en la valoj de la Rumelio, kaj sur la riverbordoj de la Genil'o kaj de la Guadairo naskiĝas propramove la violo, la irido kaj la kampanolo.

Sed ni atendu: jen la Daro, kin venas por serĉi sian fraton kaj pro tio ke ĝi ne volas esti malpli ol tiu, ornamas la valojn, kiujn superakvas, kaj penetras en la urbon tra mallarĝa valo! Ni estas en Granada; ni renkontiĝis kun ĝi, sekvinde la fluon de ĝia rivero. Supre, la nekomparebla Alhambro altigas al la ĉielo la turojn gardantajn la trezorojn de Ismail'o; pli malsupre, la domoj glitas tra la deklivo ĝis kiam ili tuŝas la riverbordon, sin puŝante laŭ fuskolorita procesio, kun iliaj fenestroj kovritaj per longlignaĵoj kaj iliaj malglataj subtenantaj muroj. Arĝenta taso plena je smeraldoj kaj hiacintoj nomis ĉin la araba Alkatib'o atente rigardante cian ĉarman fruktodonan valon, kaj

se asemejan en nuestra llanura á un ejército que desfila por largas florestas, habiendo sitios, por ejemplo sus dos célebres islas, en los que, como el Bósforo, se ofrece el delicioso espectáculo de los espejismos, en los días claros y despejados.

La flora es por lo mismo brillantísima. Su benigno y corto invierno hace crecer las plantas tropicales y favorece la duración de las más delicadas especies. El naranjo, el almendro, el granado, el limonero, el albaricoque, el melocotón, son sus árboles favoritos; las rosas crecen con tanta abundancia como en los valles de la Rumelia, y en las orillas del Genil y del Guadaira nacen espontáneamente la violeta, el lirio y la campánula.

Mas esperemos: ¡hé aquí el Darro que viene á buscar á su hermano y que, por no ser menos que aquél, decora las cañadas que inunda y penetra en la ciudad por un valle estrecho! Estamos en Granada; hemos topado con ella, siguiendo la carrera de su río. En lo alto, la incomparable Alhambra eleva al cielo las torres guardadoras de los tesoros de Ismail; más abajo, las casas se deslizan por la pendiente hasta tocar la orilla, empujándose en abigarrada procesión con sus ventanas cubiertas de celosías y sus labradas zapatas. Taza de plata llena de esmeraldas y jacintos te llamaba el árabe Alxatib al contemplar tu vega encantadora, y bien hizo el *Rey Chico* en llorar como débil mujer al subir las pendientes de su ridícula corte de Andarax, supuesto que por mucho menos lloró Fósari al bajar la escalera de los Gigantes.

## Gazeto Andaluza

bone faris la Malgranda Reĝo (1) kiam li ploris kiel malforta virino, suprenirante la deklivaĵojn de lia ridinda kortego de Andaraks'o, supoze ke pro multe malpli ol tio ploris Foscaro, subenirante la ŝtuparon de la Gigantoj.

Estas en la ok andaluzaiaj provincoj tiel estimindaj urboj, ke bone meritas tio dediĉi al ili memorigaĵon. En la Kadiz'a provinco, Herrez'o, pro ĝiaj famaj vinberujkampoj kaj ĝiaj nenumerigeblaj vintenejoj; Sanlukar'o, pro ĝia lüadata manzanilja (2); San Fernando pro ĝiaj karakterizaj salamasoj, grandegaj piramidoj kiuj memorigas al ni tiujn de Egipto, trovataj ĉiupaŝe en tre grandebenaĵo; kaj la Puertos'o, kie la boka (3) kaj la langusteto kuirigas per salakvo kaj oni alternas ilin kun la seviljana olivoj, por trinki je la dekunua (4) kun la kanoj (5) da tiu vino. En tiu de Malako, Antekero, pro ĝia ŝtonego de la Geenamigintoj; Rondo, pro ĝia Deklivtranĉaĵo, kaj Marbeljo kaj Estepono, patrujo de la ĉarmo kaj de la kontrabando. En tiu de Seviljo, Eciĥo, la antikva Suna urbo, pro ĝia elegantaj turoj kaj ĝia riĉa distrikto, plenigita per bienetoj kaj olivarbejoj; Alkala'o de Guadairo kiu, pro ĝiaj originalaj perspektivoj ŝajnas pli bone sviza ol hispana; Karmono kaj Osuno, kiuj montras akropolon kaj nekropolon; kaj Utrero kaj Marĉeno, ankoraŭ enkaŝteligitaj.

En tiu de Kordoba ni trovas Lu-

1) Boabdil'o.

(2) Pomodora vino.

(3) Markonka bestero.

(4) Oni diras tiamaniere, malgran ke la trinkado estu en alia horo el la vespero.

(5) Glaseto da vino.

Hay en las ocho provincias andaluzas pueblos de tanta valía que bien merece dedicarles un recuerdo. En la provincia de Cádiz, Jerez, con sus famosos viñedos y sus innumerables bodegas; Sanlúcar, con su celebrada manzanilla; San Fernando, con sus típicos montones de sal, inmensas pirámides que nos traen á la memoria las de Egipto, y de las que se hallan á cada paso, en una grandísima extensión; los Puertos, donde la boca y el langostino se cuecen con sal, y se alternan con las aceitunas sevillanas para *tomar las once*, con las *cañas* de aquél vino. En la de Málaga, Antequera, con su peña de los Enamorados; Ronda con su Tajo, y Marbella y Estepona, cuna de la gracia y del contrabando. En la de Sevilla, Ecija, la antigua ciudad del Sol, con sus esbeltas torres y su rico término, poblado de cortijos y olivares; Alcalá de Guadaira que, por sus originales perspectivas, parece más bien suiza que española; Carmona y Osuna, que ostentan acrópolis y necrópolis y Utrera y Marchena, todavía encastilladas.

En la de Córdoba hallamos á Lucena, cuyas mujeres de raza hebrea, recuerdan las gracias de las espiadoras de la Biblia; Montilla y Rute, cuyos solos nombres encienden la sangre del obrero, del cazador y del trabajador del campo: Priego, cuyas peras *entran pocas*

cenon, kies virinoj el hebrea kasto, rememorigas la ĉarmoju de la rikoltistinoj de la Biblio; Montiljo kaj Ruto, kies nuraj nomoj bruligas la sangon de la laboristo, de la ĉasisto kaj de la kamparano (1); Priego, kies piroj *eniras malmulte en funto*, laŭ diras la manĝemuloj el la regiono, kaj La Rambla, kie fabrikiĝas tiuj malvarmigantaj kaj belvidiĝaj *bukarajhoj* (2), kiuju oni lokas en la andaluziaj kruĉujoj. Fine, la miriada da vilagetoj, penditaj kiel ĉarmaj nestoj en la Alpuharaj, Orhivo, Albuĵol'o, Motril'o; la unua, apogita sur la malsupro de la granda montaro kaj la duaj kuntiriĝintaj kiel maŭroj de reĝo (3), sur la Mediteranea marbordo.

Krom tiuj detaloj, la tuto de nia regiono havas kiom da variantoj kaj genialaĵoj povas imagi la vojaĝanto La fruktodonan valon, la glatan monteton, la nevenkeblan altaĵon, la kreskajaraĵn kontrastojn kaj tiujn, kiujn, montras la direkto de ĝiaj riveroj, la deklivoj de ĝiaj valoj, la montoj, la arbaroj kaj la fermentaj kampoj. Riĉegaj minoj, mineralaj varmakvoj ŝtonminoj de multekostaj marmoroj, arbaroj kun bonegaj lignoj kaj montodeklivoj riĉaj pro alpaj paŝtoherboj, ornamantaj kreskaĵoj kaj resanigaj herboj, kompletigas la havigon kiu esis lotata al nia regiono; malgranda tera Paradizo, en kiu ankaŭ sufiĉegas la filinoj d'Evo, de grekromana profilo, azialio, gota busto, hebrea brusto, afrikaj okulol kaj brovoj, japa-

*en libra*, como dicen los glotones de la comarca, y la Rambla, en donde se fabrican esos búcaros frescos y rozagantes que, á la manera arábiga, se colocan aún en los alcarraceos andaluces. Finalmente, la miriada de pueblecitos, colgados como graciosos nidos en las Alpujarras, Orjiva, Albuñol, Motril; el primero recinado en la falda de la gran sierra, y los segundos, acurrucados como moros de rey en la costa mediterránea.

Aparte de estos pormenores, la totalidad de nuestra región tiene cuantas variantes y genialidades pueda imaginar el viajero. El valle feraz, la suave colina, la inexpugnable altura, los contrastes de vejetación, y los que ofrecen la dirección de sus ríos, la inclinación de sus valles, los montes, selvas y cotos. Minas riquísimas, aguas termales, canteras de mármoles apreciados, bosques con excelentes maderas y vertientes ricas en pastos alpinos, plantas de adorno y hierbas medicinales, completan la dotación que cupo en suerte á nuestra comarca; pequeño Paraiso terrenal, en que abundan también las hijas de Eva, de perfil greco-romano, talle asiático, busto godo, torso hebreo, ojos y cejas africanos, mano y pié japoneses y de armónico conjunto, que supera á las de Circasia y Grecia. La palmera y el junco le han dado la flexibilidad y el elegan-

(1) Pro tio ke en ili estas multe da Brandfabrikejoj

(2) Kruĉejo el ruĝa argilo nomita hispane *bukaro*.

(3) Militistoj el Maroko.

naj mano kaj piedo kaj de harmonia aro, kiu superas tiujn de Cir-kasio kaj Grekujo. La palmo kaj la janko donis ŝi la flekseblecon kaj la elegantan balanciĝon; la rozo, la kolorajn gradigojn de ŝia delikata epidermo; la mimozo ŝian nervan koieremecon, kaj la migdalarbo kaj la granatfloro la blankecon kaj la ruĝecon de ŝiaj ĉiam ridetantaj kaj malvarmetaj buŝoj.

La hindaj fabeloj parolis nin pri plaĉa loko en kiu, simile al ĝardeno de Armido, kiun pentris al ni Tasso, konfuziĝas la feinoj kaj la floroj; io simile okazas en Andaluzio: la floroj kaj la virinoj kunloĝas tiel intime ke ili konfuziĝas preskaŭ ĉiam. En la kristalfenestro, en la balkono, en la teraso, en la kradfenestro, floro ĉiam supozas virinon: floroj kaj virinoj estas plej bona ornamaĵo de tiu ĉi patrujo kiu estas meritinta la nomon: *Patrujo de Mario Sanktega*.

(El hispana lingvo tradukis,)

JOSEFO GARZÓN RUIZ.

## La Kapitano Veneno

(Daŭrigo) <sup>(1)</sup>

En unu el tiuj tro danĝeraj ekmontriĝoj, ŝi vidis ke la militistaro jam estis antaŭenirinta ĝis la por-do de tiu domo, dum la ribeluloj returneniris ĝis la placo Sankto Domingo, daŭrigante gradigarange la pafadon, mirinde trankvilaj kaj bravaj. Kaj ŝi vidis ankaŭ ke antaŭ la soldatoj, kaj eĉ la oficiroj kaj estroj, rimarkiĝis pro lia energia kaj

(1) Vidu la numeron 7.<sup>an</sup>

te balanceo; la roza las gradaciones de color de su fina epidermis; la sensitiva su irritabilidad nerviosa, y el almendro y la flor de granado el blanco y el rojo de sus bocas siempre sonrientes y frescas.

Los cuentos indios nos hablan de una floresta en la que, á semejanza del jardín de Armida que nos pintó el Tasso, se confunden las hadas y las flores; algo parecido sucede en Andalucía; las flores y las mujeres hacen vida tan íntima, que se confunden casi siempre. En el cierre de cristales, en el balcón, en el terrado, en la reja, una flor supone siempre una mujer: flores y mujeres son la mejor gala de esta tierra, que ha merecido el dictado de *Tierra de Maria Santisima*.

BENITO MAS Y PRAT.

kuragega sintenado kaj pro la brulantaj frazoj per kiuj li alparolis ĉiujn, ŝajne kvardekjara viro, ĝentila kaj elegantvidiĝa, delikata kaj bela kvankam hardita vizaĝo, malgrasa kaj forta kiel fasko da nervoj, pli ol mezkreska, duone civilule, duone militiste vestita. Ni volas diri ke li surportis kazernan ĉapon, ornamitan per tri galonetoj de kapitana insigno, redingoton kaj civilan pantanolon, el nigra drapo; glavon de infanteria oficiro kaj kartocujon kaj pafilon de «ĉasisto»...

ne militistara, sed por kunikloj kaj perdrikoj.

Rigardanta kaj admiranta estis ĝuste la Madrididino tiel strangan personon, kiam la respublikanoj pafadis sur lin, pro tio ke ili lin konsideris pli timinda ol ĉiujn aliajn, aŭ lin supozis Generalo, Ministro aŭ simila, kaj la malfeliĉa kapitano, aŭ tiu kiu li estis, falis sur teron kiel vundita per fulmo kaj la vizaĝo banita per sango, dum la ribelantoj gaje forkuris, tre kontentaj pro sia heroaĵo, kaj la soldatoj ekkuris post ili, deziregante venĝi la malfeliĉan estron.

Restis, do, sola kaj muta la strato, kaj meze de ĝi, kuŝigita kaj elsanganta, tiu bona sinjoro, kiu eble ankoraŭ ne estis mortinto, kaj kiun diligantaj kaj piaj manoj povus liberigi de morto. La junulino ne ŝanceliĝis: ŝi kuris tien kie estis ŝia patrino kaj la servistino; klarigis al ili la aferon, diris al ili ke tra la strato Preziados jam ne estis pafadoj; ŝi kontraŭbatalis ne tiel multe la tre prudentajn rimarkojn de la malavara gipuzkoanidino, kiel la pure bestan timon de la senforma galicidino, kaj post malmulte da minutoj la tri virinoj transportis peze, en sian honestan hejmon kaj lokis en la honoran alkovon de la ĉefa saloneto, sur la luksa lito de la vidvino, la sensentan korpon de tiu, kiu se li ne estis la vera protagonisto de la okazintaĵo en la 26.<sup>a</sup>

de Marto, estos tiu de nia privata historio.

### IV.<sup>a</sup>

#### PROpra kaj MALPROpra HAUTO

Malmulte da tempo perdis la bonfaremaj virinoj por ekscii ke la ĝentila kapitano ne estis mortanta, sed nur sen saĝeco kaj sentoj, pro tio ke li ricevis oblikve kuglovundeton sur la frunto. Ili ankaŭ ekscii ke li havas travunditan kaj eble ostropmitan lian maldekstran krucon, ke devas ne esti senzorgata, eĉ unu momenton, tiu vundo, el kiu fluas multe da sango. Ili eksciis, fine, ke tio sola vere utila kaj efika kion ili povas fari pro la malfeliĉulo estas voki, tuj, kuraciston.....

—Panjo (diris la kuraĝa junulino): dupaŝe de ĉi tie, je la kontraŭa trotuaro, loĝas Doktoro Sanĉez.. ; ke Rozo iru tien kaj lin venigu... Ĉio estas momenta afero, kaj ĉar oni ne riskos pro ĝi iun dangeron...

Tiam, sonis tre proksima pafado, al kiu sekvis kvar aŭ ses, pafinta tempe kaj malproksime. Poste, denove regis profunda silento.

—¡Mi ne iros! (gruntis la servistino.) Tiu, kiu ni ĵus aŭdis, estis ankaŭ pafado; kaj la sinjorino ne volas, eble, ke oni mortpafu min kiam mi trairos la straton.

—¡Malsaĝa! ¡Sur la strato okazas nenio!—rediris la junulino, kiu ĵus ekmontriĝis ĉe unu el la kradfenestroj.

—¡Foriĝu de tie, Dolorumo! —  
kriis la patrino, rimarkante tion.

—La unuesoninta pafado (daŭrigis la nomita Dolorumo) kaj pri kiu respondis la militistaro de la «Puerta del Sol», devis esti tiu, kiun de la subtegmento ĉe la 19.<sup>a</sup> numero, faris tre malbela viro, al kiu mi estas rigardanta reŝargi la dikpafilon... La kugloj, sekve, preterpasas nun tre altaj, kaj estas nenia danĝero trairi nian straton. Kontraŭe, estus plej granda el la malnoblaj se ni lasus morti tiun malfeliĉulon, por ŝpari al ni malgrandan ĝenon!

—Mi iros por venigi la kuraciston, —diris la patrino, finante bandaĝi, laŭ sia maniero, la rompitan kruron de la kapitano.

—Tion ne (kriis la flino, enirante en la alkovon): ĝkion oni dirus pri mi?—¡Mi iros, kiu estas plijuna kaj kiu iros plirapide!—¡Vi jam sufiĉe suferis en tiu ĉi mondo, pro la feliĉaj militadoj!

—¡Tamen, do, vi ne iros! — ordone rediris la patrino.

—¡Kaj mi ne ankaŭ!—aldonis la servistino.

—¡Panjo, lasu min iri! ¡Mi vin petegas, je la rememoro de mia patro! ¡Mi ne havas animon por vidi kiel elsangadi tiun ĉi kuraĝulon, kiam ni povas lin savi!—¡Rigardu, rigardu, kiel malmulte servas al li viajn bandaĝojn!... La sango jam degutas sub la matracoj.

—¡Dolorumo!

—¡Panjo...; lasu min! Mi estas tiel aragonidina kiel mia patro, kvankam mi naskiĝis en ĉi tiu malnobla Madrido. Plie, mi ne opinias ke al ni, la virinoj, oni estas doninta iun privilegion, liberigante nin havi tiom da honto kaj tiom da kuraĝo kion la viroj.

Tiel diris tiu beljunulino, kaj antaŭ ol rekonsciiĝis ŝia patrino de la miro akompanita de morala submetiĝo aŭ senvola aplaŭdo, kiun kaŭzis al ŝi tiu suverana decido, Dolorumo jam estis trairanta sentime la straton Preziados.

(*Estos daurigota*).

## Kroniko

*Ni tre petas ĉiujn grupojn, kiel izolitajn samideanojn, ke ili sendu al ni kiel eble plej akurate mallongajn raportojn pri ilia agado kaj pri la progresoj de Esperanto en ilia urbo aŭ regiono. La raportoj devos alveni ne pli malfrue ol la 15an de ĉiu monato.*

La esperanta Societo «Gerona Esperantistaro» unu el la du kiuj estas en Gerono, pretendis solenigi Kongreson kontraŭ la opinio de la Societo «Amo kaj Espero». Tial, la Prezidanto de ĉi tiu grupo, sendis al la Sinjora Moŝto Urbestro de tiu urbo leteron, en kiu li sciigis lin ke, nedube pro eraro oni alportis



en lian hejmon la oficoskribon de la urbestrejo rilate al la proksima solenigado de assembleo aŭ Kongreso esperantista, oficoskribo kiun li sin honoras resendi lin, ĉar tiu Societo ne partoprenas la diritan okazintajn tial ke li opinias pri ĝi, ke ĝi estas malutila por la boina propagando de l'Esperanto kaj la seriozeco kaj patruja fervoro, kiujn meritas la urbo Geronon, supoze la kvanto kaj kvalito de la personoj kiuj, kontraŭ la opinio de la kleraj esperantistoj en la urbo kaj ĝia provinco, kaj kun rimarkinda malĝentileco, volis efektiviĝi ĝin ĉi-dangere, ne aŭdante nek unuigante opiniojn, arogante al si prezentaĵon kaj rajtojn, kiujn neniu havigi al ili. Kiel la fakto alporti la oficoskribon al tiu hejmo povus signifi ke la Urbeŝtrara Moŝto, kiam interkonsente decidis, havis kredon, ke tiu ĉi Societo partoprenis la assembleon aŭ Kongreson, ĉar estas publikaj kaj de ĉiuj konataj ĝia malavaraĵoj klopodoj efektiviĝita por la Esperanto kaj kulturo de Geronon, interne kaj ekstere de ĝia urbeŝtrara Domo, ne nur li sin kredas devigata montri la diritan aferon sed ankaŭ fari aliajn konsiderojn. La efektiviĝanta okazintaĵo estas pure socia aŭ teknika en la specialeco de l'Esperanto kaj klare estas ke nur kiam plej parto el la analogiaĵoj ĉe la komunumo estas konformaj al la ideo kaj havas

certecon pri la sukceso, tiam oni povas kaj devas peti la favoron kaj helpon de la aŭtoritatoj, kio ne okazas en tiu ĉi okazo, ĉar nur inĵeroj en la grupo «Gerona Esperantistaro» certe malmultaj, estas tiuj, kiuj volas efektiviĝi ĝin kontraŭ la opinio de la pli multoj kaj ne rigardante atente la malsukceson. Krom tio, la konigata letero estas disdonita al ĉiu samlanda samideano, de S.<sup>o</sup> J. Domenech, Sekretario de la nomita Societo «Amo kaj Espero». Ni ricevis ekzemplon kune kun ĝia regularo, kiun ni lin dankas.

\* \*

La Esperantista Grupo el Barcelono, «Semo» (Carmen 30, principal), eldonis belegajn poŝtkartojn pri la Internacia Aoro Stenografio, kiujn ni rekomendas al tiuj dezirantaj eklerni la simplan sistemon de stenografio fonetika, ĉiulingve taŭga, rapidpova kaj facila, inventita de Rudof Sprotte, en Berlino-Charlottenburg. La poŝtkarto estas du malsimilaj, sur kiuj oni vidas skizon pri la sistemo, regulojn kaj specimenojn: plie, la himnon Esperantistan aore skibitan. Por aĉeti kompletan lernolibron de Aoro, sin turnu al «Esperanto-Verlag, Möller & Borel, Berlin S. W. 68, Lindenstr 18/19 – Kosto: 0.20 Sm. — «La Verda Standardo», internacia Esperanto-revuo ĉiunmonata, havas konstantan fakon pri Aoro. Redaktata de A. Marich, en «Aoro-Centrejo Tut-

monda». (Budapest, IX; Ullól-ut, 59). Jarkosto : 1.59 Sm.

\* \*

Nia estiminda kunlaboranto, la klera esperantisto S.<sup>o</sup> Vicente Inglada Ors, Staba kapitano kaj Geografia inĝeniero, estas elektita *Akademiano*, el la Lingva Komitato, laŭ la balotado en la nuna monato. Pro tio ni multe gratulas lin, kaj ankaŭ la hispanan esperantistaron.

\* \*

La «Universala idea societo internacia de progresema gestudentaro» mallonge Ĉiostudenta Asocio volas starigi «Internacian Studentan Bibliotekon»; kaj tial ĝi petegas de redakcioj kaj samideanoj ke ili sendadu al arĥivisto de Ĉ. A., Sr. N. *Hristoskoff* Bukaresto, str. I.—C. *Bratiamu* 5. (Rumanujo) ĉiujn dokumentojn pri la gestudenta vivo, nome; gazetojn, proklamojn, librojn, broŝurojn, bildojn aŭ fotografiajn, kaj tio esperantajn aŭ ne.

\* \*

Okaze de la tritaga solenigado, kiu estos en nia urbo, la prokiman monaton, rilate al la unua centjaro de kiam kunvenis ĉeni la hispana konstitucia deputataro, sub la konstanta minacado de la franca militistaro, kiu sieĝis la ĉirkaŭaĵojn, ni publikigos eksterordinaran numeron, lukse kaj ilustrite eldonitan. Tiu numero estos sendata,

krom nia abonantaro, al ĉiuj redakcioj kaj grupoj el la tuta mondo, kaj al iu ajn persono petanta ĝin, se oni antaŭsendas al ni poŝtmarkojn por pagi la poŝtspecojn.

## Crónica

Según leemos en «París Esperanto», el 21 de Junio último ha tenido efecto en la capital de Francia un matrimonio esperantista, entre Mlle. Ivonne Dusset y M. Joseph Marty. Los testigos eran Mademoiselle Royer y M. Carlo Bourler, y todos los asistentes esperantistas. Un soberbio ramo de rosas y lilas blancas fué ofrecido á los novios por las secciones 19 y 20, extensión del Grupo de París.

\* \*

Del 29 al 31 del actual se celebrará en *Copenhague* un Congreso Esperantista, que coincidirá con el Congreso Obrero en que se ha puesto á la orden del día la adopción de una lengua internacional. En el programa figuran, una sesión magna, de apertura, una cantata por 200 ejecutantes, discursos de los representantes de las diferentes naciones, exposición pública, conferencias y conciertos, paseo en automóviles á través de la ciudad, excursión por *l'Oresund*, hasta la estación balnearia de *Sktsborg*, donde tendrá lugar una fiesta nocturna,

con iluminación y fuegos artificiales, etc., etc.

\* \* \*

El Comité del Grupo del Havre, invita cordialmente á todos los Esperantistas de Normandia, *federados* y *no federados* á tomar parte en el tercer Congreso anual de la Federación Esperantista Normanda, que se reunirá en el Havre el 28 del corriente. La coincidencia de ese Congreso con la «Grande Quinzaine d'Aviation de la Baie de Seine» y el «Congrés de la Fédération Aéronaute internationale» llevará al primero gran concurrencia de *samideanos*.

\* \* \*

Con fecha definitiva para el segundo Congreso de los Esperantistas bohemios han sido elegidas la del 24 y 25 de Septiembre próximo. En el programa figura una excursión al histórico Castillo «Karlův Týn»; y se ha anunciado una visita de los congresistas ansburguenses á la Asociación Central Bohemia (*Centra Asocio Bohema Unio Esperantista.*)

\* \* \*

La Sociedad internacional de estudiantes amantes del progreso («Čiostudenta Asocio») ha preparado en «Luhačovice» («Moravia») una hermosa Colonia de verano, para los jóvenes esperantistas, miembros de la misma, donde se les dá nos-

pedaje absolutamente gratuito y alimentación por precio muy económicos. Diariamente habrá conciertos, bailes, serenatas una ó dos veces por semana, iluminaciones y fuegos artificiales; hasta representaciones teatrales, de ópera y ópera. También se dará un curso completo de Esperanto.

Pedid informes al Secretario señor Joza Mares — «Esperanto-Luhačovice» (Moravia Austria.)

\* \* \*

Todavía no ha sido resuelta la cuestión planteada por el Congreso general ruso en el próximo pasado mes de Mayo, sobre el Congreso internacional en dicha nación.

Algunas personas propusieron prepararlo en Varsovia, como lugar del nacimiento de nuestra querida lengua, pero el maestro mismo se opuso á ello, diciendo que no es éste el deseo del pueblo polaco. Probablemente, en el 6.º Congreso que se celebra en estos momentos en Washington, se señalará, según costumbre, la nación donde ha de tener lugar el 7.º

El segundo Congreso general ruso («Tutruslanda Esperantista Kongreso») tendrá lugar en Moscou.

—\*—\*—

## Humorajhoj

EN CADIZ'A KAFEJO

—Ho! feliciaj la okuloj vin rigardanta. (1) ĜEl kie vi venas?

—El la Grupo; ĵus legis en «Gazeto Andaluzia» la belan verketon de nia kara kunbatalanto Sro. Garzón, titolitan «Recepto de la Gazpacho», tiel ŝatindan kiel nia famkonate regionala manĝaĵo.

—Vere, la artikoleto estas ne nur ĉarma sed entute fondita en laŭklasika maniero. Tamen, estas necese, mi kredas, iom modifi...; mi ankaŭ sentas min reformema...

—Ĉu vi, do, kuraĝas modifi la jarcentegan recepton de nia regionala malvarmiga supraĵo?

—Ĝi estas vere netuŝebla: mi nur parolas pri nia kara lingvo. Ni, andaluzianoj, ne devas akcepti de nun la lastenaskitan sufikson de Sro. Boirac je aĉo, kreitan por montri la malestimon, la malŝaton...

—Ĉu pro respekto al *Fundamento*?

—Ne, pro la indeco nia amata gazpacho.

E. CANO.

\*\*\*

Infano naive demandas al sia patrino:

—Ĉu la anĝeloj flugas?

—Jes, mia kara, jes.

(1) Famila salutmaniero che Hispanujo.

—Ankaŭ, do, nia servistino flugas.

—Kial?

—Tial ke mia patro diris al ŝi... Anĝelo!

—Ho, mia kara, certe jes, ŝi forflugos morgaŭ mem.

C. ESCOBÉS.

Estis en Seviljo <sup>\*\*\*</sup> bubo famkonata pro tio ke li improvizis tuje menzogon.

Anglo, sciinta la lertecon de la knabeto vokis lin:

—Mi donas al ci du spesmielojn, se ci diras al mi tre grandan menzogon.

—Sed, vi promesis, al mi du!, diris la bubo, rapidege senpripense.

—Prenu ilin; diris admirita la anglo.

X.

ACABA DE PUBLICARSE

### El Esperanto al alcarce de todos

Vulgarización de Gramática Esperanto-Española,

por

FERNANDO SOLER VALLS

Oficial de Telégrafos,

Presidente del Grupo Esperantista de Enguera (Valencia).

2.<sup>a</sup> EDICIÓN, corregida y aumentada con un

Formulario de Cartas

en Esperanto y Español.

Precio: 2 Ptas.

DE VENTA EN LAS PRINCIPALES LIBRERIAS  
Y EN CASA DEL AUTOR.

Imp "La Unión"—F. Fontecha, 4—Cádiz